# I N F O R M I L O

*Esperanta tradicio – kultura heredaĵo en Kroatio (Z-7298/2019)*

***1-2026 (142) januaro ĝis marto***

***Esperanto društvo Rijeka* Esperanto Societo Rijeka***

***Blaža Polića 2 51000 RIJEKA Hrvatska-Kroatio***

Tel.+385(0)(51)334-670 lunde de la 18a ĝis la 20a horo

Naslovi na mreži-retadresoj: rijeka.esperanto@gmail.com

**Prezidanto: Emil Hrvatin tel: 091 882 2986**

**Redaktoro: dr-o Ana Alebić-Juretić, dipl.inĵ. tel.: 091 563 1634**

Rijeka, la 20-an de aprilo 2026.

Estimataj gesamideanoj!

La nova jaro komenciĝis per mia longa vojaĝo al suda hemisfero por partopreni en jara kongreso de Aŭstralia (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto asocio (NZEA) kiu okazis en Aŭklando. Post la kongreso mi vojaĝis du semajnojn tra Nov-Zelando, kaj unu tra Aŭstralio (Melburno kaj Sidnejo). La plej grava evento por nia Esperanto societo okazis je la fino de marto, kiam delegacio de Klubo vizitis Triesta Esperanto Asocio (TEA) por renkonti gelernantoj de Milano kaj paroli pri vivo kaj Esperanto ĉe aŭ trans la limo.
Legu kaj ĝoju.

## ESPERANTISTOJ EL RIJEKA ĈE LA KUNVENO KUN ITALAJ GELERNANTOJ

Laŭ la invito, d-ro Ana Alebić-Juretić kaj Nirvana Beltrame Ferletta la 30-an de marto 2026 vizitis la Triestan Esperanton Asocion (TEA) por renkontiĝi kun la instruistino, edukistinoj kaj, for la komon gelernantoj de la Instituto de Grafikaj Artoj Rizzoli en Milano.

La instruistino Alessandra Orlando kun la klaso gajnis premion en la regiono Lombardio por projekto, kies titolo estis: "*La Orienta Landlimo, historioj de gentoj, lingvoj, konfliktoj kaj repaciĝoj"*. Dum la tritaga vizito al Triesto kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, ili ankaŭ vizitis TEA-n, ĉar la instruistino estas esperantistino mem. La ĉefa celo de Esperanto estas uzi ĝin i for plibonigi la interkomprenon inter malsamaj popoloj. Tamen la TEA kaj nia Esperanto klubo ĉiam havis bonan kunlaboron, ankaŭ en la malbona tempo. La gastoj estis informitaj ke la parton de la itala literaturo oni trovas trans la limo, en Kroatujo. Tial ni prezentis la italan verkistinon Nirvana Beltrame Ferletta kaj donacis al la instruistino kaj al la TEA estraro ekzemplerojn de ŝia libro *"Iu ajn mateno*" (Una mattina qualsiasi), kiun ŝi verkis pri la vivo en Rijeko (eksa Fiume) perdanta siajn italajn trajtojn.

(*Verkis kaj fotis: A. Alebić-Juretić*)



*Kunveno kun la gelernantoj en TEA*

## AŬSTRALIA kaj NOV-ZELANDA JARKUNVENO *Aŭklando, de la 11-a ĝis la17-a de januaro 2026*

La novjaro en la suda hemisfero komenciĝas per la komunaj jarkunvenoj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj la Nov-Zelanda Esperanto Asocio (NZEA). Ĉiun kvinan jaron la jara kongreso estas organizata en Nov Zelando. Tial, la lasta *Somera kursaro kaj kongreso* estis organizita en Aŭklando, de la 11-a ĝis la 17-a de januaro 2026, en plena somero. La kongresejo estis Retiriĝa Centro Sankta Francisko, tre bela modernisma konstruaĵo, farita en kvardekaj jaroj de la dudeka jarcento kun malgrandaj unulitaj ĉambroj meblitaj laŭ mezuro. Ĉirkaŭ 40 esperantistoj partoprenis la kongreson, la plejparto el Aŭstralio kaj Nov-Zelando, sed ankaŭ el Kanado, Japanio, Sudameriko kaj tri eŭropanoj, la franca fizikisto *Joël Fontaine* kun sia edzino kaj mi. Ni ambaŭ prelegis pri la lumo, sed li pri la fizika parto (*Lumo, ne nur…*), kaj mi pri la kemia (*Lumo kaj aeropoluado.* ). Kredu min, ni ne kunordigis la temon.

Krom la prelegoj oni havis Esperanto-kursojn je tri niveloj: por komencantoj (gvidanto Sandor Horvath), progresantoj (Joanne Cho) kaj spertuloj (Moises Herrera), jogon, cirklan dancon, ekskurson al Devanport kaj




*Somera kursaro kaj kongreso en Aŭklando, de la 11-a ĝis 17-a de januaro 2026. (fotis: H. Palmer)*

fotokonkurson. Mia foto de du niaj instruistoj (Joanne kaj Moises) titolita *Kiu estas pli bona?* atingis la trian lokon. La respondon al la demando mi ne scias, ĉar ambaŭ estas tre bonaj instruistoj.

Post la kongreso mi vojaĝis tra Nov-Zelando dum du semajnojn kaj vizitis kun Sandor kaj Helen alian esperantiston Jonathan kiu loĝas en Takaka, en Golden Bay, ĉe la norda marbordo de la Suda insulo. Jonathan estas emerita kuracisto el Usono, kiu translokiĝis en Nov-Zelandon antaŭ 18 jaroj. Li lernis Esperanton aŭtodidakte helpe de retaj kursoj kaj ŝatas gastigi aliajn esperantistojn.

*(Verkis: A. Alebić- Juretić)*

## ESPERANTO DOMO SIDNEJO

Post Nov-Zelando, mi vizitis ankaŭ Melburnon kaj Sidnejon. Melburno estas granda kultura centro de Aŭstralio, sed en tiu mallonga tempo, mi pli ĝuis la naturan belecon de ĝia cirkuaĵo, kiel la *Dek Du Apostoloj* aŭ la ĝangalon kun bestoj en la naturo kiujn ni povas vidi nur en bestoĝardeno. La kulturon mi ĝuis en Sidnejo, en la Operejo laŭ mia opinio, la oka miraklo de la mondo, mirinda konstruaĵo, en plena brutalisma stilo, sed tre bone farita.

En Sidnejo mi loĝis senpage en la Esperanto domo (Esperanto House). La Esperanto domo estas familia domo de la 19-a jarcento, en plena kolonia stilo, kun forĝita barilo ĉe la enirejo kaj balkono ĉe la unua etaĵo en la kvartalo Redfern, tre proksime al la stacidomo de la urba trajno. Pro manko de komforto, tiaj domoj estis forlasitaj en la sepdekaj jaroj. Tiam iuj Esperantistoj aĉetis unu el ili kaj donacis ĝin al Sidneja-Esperanto Klubo, kaj poste ĝi fariĝis sidejo de Aŭstralia Esperanto-Asocio. La domo estis renovigita, kaj nun havas belan aspekton, kiel la tuta kvartalo. Ĝi havas lernejon kaj akceptejon en la teretaĝo, kaj grandan bibliotekon en la unua etaĝo. Unu parto de la domo estis luita al grupoj de artistoj. La domo havas gastĉambron por esperantistoj, kie oni povas loĝi ĝis 15 tagoj senpage, poste la prezo estas 50 AUD tage. Kompreneble, la gastoj devas mem purigi la ĉambron .




*La Esperanto domo en Sidnejo*

La renkontiĝo de la Sidneja klubo okazas merkrede de la 10-a ĝis la 18-a horo, kiam la vizitantoj povas babili, ludi aŭ legi librojn aŭ ĵurnalojn. Pri la domo nun zorgas Dmitrij Luchnikov kaj Nicol Else. Dum mia restado mi renkontis tie maljunan esperantiston, kiu en la okdekaj jaroj parolis Esperanton kun laboristoj alvenintaj al Aŭstralio el orient-eŭropaj landoj kaj kiuj ne sciis la anglan. Similan memoron pri Esperanto en bazlernejo havis ankaŭ maljunulo de la najbara *Asocio por la bona registaro* de la *Henry George Domo* (Henry George House) en Sidnejo , kie alia gasto el Germanujo, Reiner Kurtz, havis prelegon pri Esperanto. Estas klare, ke disvastigo de Esperanto ne eblas sen subteno de la ŝtato

(*Verkis kaj fotis: A. Alebić-Juretić)*

## LA OKA KUNSIDO DE KEL ESTRARO

La 8-an de marto 2026 okazis la oka, kaj la lasta kunsido de KEL estraro en tiu ĉi mandato. Tial la estraro devas prepari la novan asembleon kaj elekti novan estraron dum la KEL kongreso en Karlovac, okazonta la 20-an de junio 2026. *(A.A-J)*

## 111-a UNIVERZALA KONGRESO EN GRAZ

La 111-a UK okazos en Graz, Aŭstrio. Informoj pri la evento estas trovebla ĉe la retejo:

https://uk.esperanto.net/2026/

*Provleganto: Elda Dörfler*